



Mondcivitano



Organo de Cearaa Esperanto-Asocio - Brazilo - 2-a Jaro - n-ro 5 - Februaro 2007/1
<http://www.esperantoceara.org.br>



CEA en la Marŝo Porpaca en Fortaleza (2006)/leitejr@uol.com.br

Mondcivitana letero

CEA estas nun en nova sidejo. Sed vi, kara amikino aŭ amiko, kiu eksciis pri tio kaj ankoraŭ ne prenis noton pri la nova adreso, ne maltrankviliĝu.

Se, post elveturi la aŭtobuson aŭ parki la aŭton, viaj piedoj kondukos vin al la sama loko de la kutimaj kunsidoj aŭ kursoj de Ĉiu sabato Ĉe "la domo de la patrino de D-ro Wandemberg", ne timu, ĉar vi estos ĝuste antaŭ la domo apud la nova sidejo de nia asocio, tio estas, en la numero 413 de la tre bone konata strato Armando Oliveira.

Ni cearaanoj esperantistoj senescepte ŝuldas la antaŭan kaj la novan adreson al la grandanimeco de la bonvolema patrino de nia kara amiko Prezidanto de CEA. Pacience eltenante la Ĉiusabatan pilgrimadon de ni verduloj, rezigne aŭdinte niajn senfinajn salutojn kaj resalutojn, ŝi fariĝis nia simbola patrino.

Fakte tute ne dubindas tio, ke la pacienco estas unu el la plej gravaj trajtoj de la personeco de la obstinaj loĝantoj de Esperantujo. Kiu ajn ne ellernos tiun gravan lecionon baldaŭ estos trafita de neevitebla laciĝo, kies sekvon, ĉu abruptan, ĉu subtilan, la movadulo nomas kabeĝo.

Do ni ĝisfunde lernu tiun lecionon pri pacienco. Ni ne miru, ke ni ne estas translokiĝanta al malproksima kvartalo. Transpasi la muron ne signifas ties detruadon, pro la jeno: unue pro la fakto, ke ni ne estas maldankemaj; kaj due pro tio, ke ni estas singardemaj idealistoj. La problemo ne estas la fizika distanco, sed la psika distanco inter la nuna stato de la movado kaj la celo establita ekde 1887. Rilate al tiu, abundas en la historio de Esperanto pruvoj pri la sukceso de la prudenta konduado de la Ĉiutaga kolektiva tasko. Kaj tiel ankaŭ estas pruvoj de fiaskoj kaj fuŝaĵoj okazintaj de la hastaj aŭ eĉ ne sufiĉe pripensitaj projektaĉoj, spite al la kulima bruego per kiu tia maniero agi montras sin antaŭ la ceteraj gapitaj spektantoj.

Do brikon post briko, nia multjara masonista laboro por la paco neniam rezultigos barojn inter fratoj. Male, nia laboraĵo inter najbaroj certe rezultigos la estontan domon. Kia estos tiu domo? Certe ĝi estos forta konstruaĵo starigita el la granita fundamento sur la sino sen limoj de nia komuna patrino, kies nomo estas Tero, nia bela kaj blua planedo.

leitejr@uol.com.br

Io nova

Inaŭguro de la nova sidejo kaj enpostenigo ĉe CEA, jen la plej freŝaj.

Hodiaŭ la 3-an februaro 2007, je la 5-a posttagmeze, okazas la inaŭguro de la nova sidejo de CEA. En la festa kunsido, venas kutimaj kaj la ne tiel kutimaj figuroj de la loka movado.

La ceremonio de enpostenigo de la estraro de CEA ankaŭ estas grava afero en ĉi tiu solena vespero. Rimarkindas la fakto, ke la enpostenigo tute ne signifas burokratan aferon, sed publikan certigon kun celo plenumigi la multflanka agendo de CEA. Jen la nuna teamo de nia asocio:

Estraro: Prezidanto - Wandemberg;
Vicprezidanto - Afonso; Sekretariino - Damiana;

Vicsekretariino - Graça; Financa Direktoro - Roberto; Financa Vicdirektoro - Antônio Bezerra. Departementaj Gekunordigantoj: Ĝenerala Kunordiganto - Hilbernon; Arto kaj Kulturo - Herbert; Pedagogio - Iraneide; Interreta Informpaĝo - Golbery; Junularo - Leandro; Infanaro - Diana; Projektoj - Albano; Propagando kaj Informado - Leite Jr.; Eventoj - Ma. Tereza; Administracio - Rubens.

Bonan laboron al ĉiuj! **Mondcivitano** atendas freŝajn raportojn kaj de la estraranoj kaj de la kunordigantoj por la ĝisdatigo de niaj informoj.

Resuma kalendaro por 2007

Ĉiu ĉi jaro promesas kaj laboron, kaj amuzon. Gravaj datoj estas notindaj.

La 3-an de Februaro estas la inaŭguro de la nova sidejo kaj okazas la enpostenigo de la estraro kaj de la kunordigantoj de CEA. Julio estas la tradicia monato de Bazila Kongreso de Esperanto en Rio de Janeiro. Ĉi-jare elstaras la 100-jariĝo de Brazila Esperanto-Ligo. Aŭgusto estas la monato de UKE, kiu okazos en Jokohamo la nunan jaroj. Jen la kongreso de Japanio. Oktobre okazas la Ago-Tago. Ni ne lasu pasigi la monaton sen agi por Esperanto. Decembro estas la tradicia Zamenhof-Festo. Notu vi, ke la 15-an de decembro la mondo pluas la pacan celon de la fondinto.

Ĉu vi memoras?



CEA en Portalegro (2005) | leitejr@uol.com.br

Retroaktiva kalkulado

La fenomeno "nova sidejo" certe renovigas nian verdan sangon. Sed la entuziasmo rajtigas ke ni faru etan

komentaron.

Hodiaŭ ni ekpreparas la fundamento de la nova sidejo. Tre bone, ĉu ne? Sed morgaŭ la tegmento estos la 43-a BKE. Ĉu vi demandas kial morgaŭ? Prenu vi kalendaron. Prenu ankaŭ via kalkulmaŝino. Faru la jenan kalkulon: la 11-an de Julio 2008 minus la 3-an de Februaro 2007 faras... Trafe! Jes, geamikoj, mankas nur 523 tagoj de la nuna dato ĝis la malfermo de la brazila kongreso de Esperanto pri kiu ni gecearaanoj respondecas, almenaŭ ekde la jeso en Portalegro antaŭ unu jaro kaj duono. La tempo kaj la vento flugas. Ni faru do la retroaktiva kalkulado: unu okulo estu sur horloĝon, kaj la alia sur nian ĝustan eron el la kolektiva tasko.

Estu ano de BEL

Brazila Esperanto-Ligo atendas vian aniĝon. Vi rajtas arigi viajn amikojn por membriĝi nian centjaran landan asocion.


Depende de la nombro de varbitaj kandidatoj, la elspezo por ke oni estu BELano povas atingi nulon. Se vi ne kredas tion, vizitu la informpaĝo de Brazila Esperanto-Asocio. Por tio vi devas tajpi sur vian komputilon la lineon de BEL: www.esperanto.org.br.

Klasĉambro

Se vi instruas Esperanton, kunlaboru kun tekston, lernmaterialon, teknikon, ktp. por la riĉigo de tiu ĉi sekcio.

Nur por instigo jen tre simpla didaktika ludo uzita en la baza kurso ĉe Federacia Universitato de Cearao. Temas precipe pri K-vortoj. La respondo estas sur la lasta piedpaĝo de la nuna eldono de Mondcivitano:

Krucvortenigma



1. ... vi estas? / 2. ... da lernantoj estas en la klasĉambro? / 3. ... patro, lia filo. / 4. ... horo estas? / 5. ... vi loĝas nun? / 6. ... estas tio? / 7. ... vi kutime televidas? / 8. La adjektiva litero. /

9. ... Ĉi estas mia foto. / 10. Nedifina objekto.
(Aŭtoris: leitejr@uol.com.br)

Leciono de William Auld

La plej grava verkisto de la lastaj 50 jaroj de Esperantujo forpasis pasintjaron.

Oni povas memori la forpasintajn homojn per sopira rigardo al pasinteco, aŭ per esperanta rigardo al la estonteco. Komprenible **Mondcivilitano** lernas la estintecon por plibonigi la estontecon. Tial ni citas gravan pensaĵon de la aŭtoro de **Infana Raso** kaj de aliaj eldonaĵoj de nia originala aŭ de nia traduzita literaturo:

La psiko de la bodiaŭa homo nepre nur escepte inklinas al idealisma, senegoisma kaj nenian profiton postulanta laboro, kia estas la pormovada. Ĝuste tia psiko, bodiaŭ ĉie renkontata kulpas, se ni tion povas litoli kulpo, pro la stagno en nia societa vivo, kio estas fenomeno internacia. Labori en societoj estas sendanka aktivado, ofte alportanta nur riproĉojn kaj neniam renomon. Pro tio mi ne malofte renkontas eldirojn de bonaj esperantistoj: "Ne plu mi volas okupiĝi pri la societa vivo. Mi verkos aŭ tradukos ion, kaj pri la societo zorgu aliaj...". Kursgvidado, agrabla atmosfero en societejoj, societaj kunvenoj, eĉ ne proponantaj altnivelan programon, tamen estas nepre necesaj ĝis la momento, kiam Esperanto estos oficiale agnoskita. Niaj societoj estas nia sola patrujo. Se ni perdos niajn societojn, ni perdos la bazon, sur kiu staras Ĉio, kaj nia evoluanta literaturo estos majesta turo staranta sur aera fundamento. En la nuna stadio de la movado ni bezonas niajn societojn.

[Norda Prismo, 1969, 1, p.4. , William Auld, citita de Anatolo Gonĉarov, en "Klubestroj, organiziĝu!", 1179 (3) marto 2005 ESPERANTO51]

Niaj legantoj ne povas enlitiĝi ĉi-nokte sen pripensi tiun ĉi suban paragrafon. William Auld antaŭ multaj jaroj emfazis la rolon de la kolektiva agado ĉe esperantistoj. Ne estas facile sed estas esence kunvivi kun homoj, kiuj havas alian pensmanieron ol la nia (kiu ŝajne estas ĉiam la ĝusta maniero agi...). Facile estas enkapigi la malveran ideon, ke la konduko de nia movado estas tasko de aliuloj. Facile estas tajpi bruegajn kaj fulmajn pensojn ĉe la virtuala mondo de la interreto. Tamen estas tute malfacile organizi la ĉiutaga vivo de la baza

organizaĵo poresperanta. La praava kluba formo aŭ la hodiaŭa ne-registara formo organizi aŭ varbi homoj estas la ĉiama nedecidebla problemo. Buŝe oni facile agas eĉ heroe, sed mane ne tiom multe.

La leciono de William Auld ne estas retorika pensaĵo. Male ĝi estas tagordo kiu penas vekigi nin el la malagememo, el la individuemo. La esenco de nia movado dependas de la esenco de nia kapableco organizi nin mem kaj ĉirkaŭ ni organizi aliajn homojn. Tiam, kunigitajn por la komuna celo, nome refraternigi la homan komunumon, la saĝaj vortoj de William Auld daŭre estos indaj je nia atento.

La nova budo de Roberto

La nova sidejo de CEA enhavas ne nur belajn kaj komfortajn lernoĉambrojn. Ĝi enhavas ankaŭ novan vendejon: la nova budo de nia karulo Roberto, la vendisto.



Tiu klarigas la kialo de la renovita rideto de nia kara vendisto,
Roberto Albuquerque.

Kontroli vi mem la nekredeblajn varojn kaj la neprokrastineblan oportunon fari la plej bonajn kaj malmultekostajn aĉetojn el la tuta Esperantolando. Li ĉiam surprizigas la klientaron kun nerezisteblaj rabatoj kaj ege flekseblaj kreditaj kondiĉoj por la plensukcesa butikumado.

Vizitu la novan budon de Roberto, sed bonvole ne parolu pri ia senpaga afero... Vi ne intencas fermi la belan rideton de nia kasisto, ĉu?



"Esperanto Elektronike" - ĵus lanĉita en la lasta UK disponeblas ĉe la budo de Roberto.

Kulturo

Brazilo festenas la 80 jariĝo de Tom Jobim, kiu daŭre vivas ĉe la koro de Ĉiuj, kiuj amas la muziko de nia lando.

Omaĝe al nia fama muzikisto Tom Jobim, **Modcivitano** publikigas "Korkovadon", unu el la plej ĝuitaj el Tom-aj kreaĵojn. Atentu vi por la fakto, ke sen Tom Jobim brazila kultura ne estus nune tiom konata mondscale. Do prenu vian gitaron, kaj kantu la inspiritan poemon, kiun Ĉiu esperantisto memore kantas kvazaŭ landa preĝo, kiam fluge estas reveninta hejmen.

Korkovado

Aŭtoro: Tom Jobim / Esperanta versio: Aaron Koenig

Enkonduko:

Am6 Ab°(b13) C7/G Gb7+/5- F7+ Bb7/9
C7+ Am7 D7/A G#°

Am6 Ab°(b13)
Kanzoneto kaj gitar'

Via amo kaj la mar'

Gm7 Gb7+/5- F7+ Fm7
Tio jam sufiĉas por feliĉo

Bb7/9 Em7
Trankvileco por pensad'

A7/5+ D7/9
Multa tempo por revad'

Dm7
Super ni videblas Korkovado

G7/9-
Ho, Redemptor' belega

Am6 Ab°(b13)
Vivo restu tia ĉi
Kun vi ĉiam apud mi

Gm7 Gb7+/5- F7+ Fm7
Ĝis la malnova flamo estingiĝos

Bb7/9 Em7

Kaj mi, estinte trista,

A7/5+ Dm7

Sen kredo je la mondo

G7 Em7 A7/5- A7 Dm7

Renkonti vin al mi signifis, ke

G7 Cm6 B°(b13) Bbm7

Ab7+ Fm7

Mi trovis la feliĉon, mia am'

Bb7/9 Em7/9

Kaj mi, estinte trista,

A7/13 Dm7/9

Sen kredo je la mondo

G7 Em7 A7/5- A7 Dm7/9

Renkonti vin al mi signifis, ke

G7 Cm6 Bbm6 Cm6 Bbm6

Cm6

Mi trovis la feliĉon, mia am'

© Ĉiuj rajtoj rezervitaj. Tiu ĉi kanto apartenas al la albumo "Aaron Brazilumas Esperante", de Aaron Koenig. Se vi ŝatas Esperanto-muzikon, vizitu la retejon: www.musicexpress.com.br.

KIU ESTASKIO / Teamo de Mondcivitano:

Kunordiganto kaj redaktoro - Leite Jr.*;
Redaktorino - Damiana; Revizianto - Roberto Albuquerque**.

Ĉiu CEAano estas redaktoro de

Mondcivitano.

Adreso: Cearaa Esperanto-Asocio - Rua Armando Oliveira, 413 - CEP- Fortaleza - CE - Brasil. Retadreso: leitejr@uol.com.br - Informpaĝo de Cearaa Esperanto-Asocio: <http://www.esperantoceara.org.br/> / * grafika projekto kaj propagando. / ** kaj vendisto.

Mondcivitano apogas la liberan uzon de softvaro. Ĉi tie ni uzas la brazilan version de OpenOffice.

Respondoj de la krucvortenigmo: 1. Kiu; 2. Kiom; 3. Kia; 4. Kioma; 5. Kie; 6. Kio; 7. Kiam; 8. -a; 9. Tio; 10. umo.